

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo Numero 1 / 2022



PRELEGO DE BERNARD-REGÏS LARUE PRI HISTORIO DE KARTOGRAFIO 1 - ANTIKVECO



En 2021, okazis jam tri prelegoj de Bernard-RegÏs pri la historio de kartografio, kaj rete, kaj en De Pianofabrik. Li kunportis kaj montris multajn belegajn mapojn, terglobojn, atlasojn, librojn, ktp. Unu mapo estis tiom longa ke ni bezonis 5 tablojn 1,60 metroj longaj por ĝin disvolvi.

➤ Vidu artikolon en la 13a paĝo.

Historio de Kartografio 2 - Mezepoko

Prelego de Bernard-Regis Larue



K O L O F O N O

42a ELDONJARO. Aktuala estis fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de EBG - Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita la 10an de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro : JM Nicolas de Buyl : aktuala@esperantobruselo.org ; **Aktuala elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>

Prezidanto : Bernard-Reĝis LARUE : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com

Sekretario : Ivo DE KEYZER sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegri fransuaz@esperantobruselo.org **Eventoj** : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Abono kaj membriĝo** : Vidu la kotiz-tabelon, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo

EBGa retejo: www.esperantobruselo.org ; **Fesjbukpaĝo**: [EspBruselo](https://www.facebook.com/EspBruselo) ; **group-io**: [Esperanto en Bruselo](https://www.facebook.com/EspBruselo)

A G Ĉ E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur la [Kalendaro de la Brusela grupo](#)






Kursoj kaj kunvenoj okazas ĉiumarde en nia kunvenejo :

De Pianofabriek, 35 rue du Fortstraat, 1060 Bruselo.





Informoj ĉe fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron, bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

JANUARO

Mardo la 11a	18:30 - 20:00		Retkunveno pri la reapero de Aktuala
Mardo la 18a	18:30 - 20:00		Retkunveno pri Jarfinaj festoj kaj grandaj decidoj por 2022
Lundo la 24a	18:30 - 20:00	 	Komenciĝo de la 2a Kursosesio por komencantoj (Fransuaz)
Mardo la 25a	18:30 - 20:00		Retkunveno pri Kiel estis, estas, estos vian karieron

FEBRUARO

Mardo la 1a	18:30 - 20:00		Retkunveno pri « Vojaĝoj »
Mardo la 8a	18:30 - 20:00		Retkunveno pri « Kiaj estas la amastrafikiloj en via urbo, regiono »
Mardo la 15a	18:30 - 20:00		Retkunveno
Mardo la 22a	18:30 - 20:00		Retkunveno



MARTO

De Ĵaŭdo la 3a ĝis dimanĉo la 6a PEKO 2022 Informoj ĉe la Verdaj Skoltoj

Mardo la 8a	18:30 - 20:00		-Kunveno
Mardo la 15a	18:30 - 20:00		-Kunveno
Mardo la 22a	18:30 - 20:00		-Kunveno
Mardo la 29a	18:30 - 20:00		-Kunveno

**ekde Marto, se eblas
en De Pianofabriek
Konsultu nian kalendaron
ĉe Eventa Servo**

APRILIO

Mardo la 19a	18:30 - 20:00		-Kunveno
Mardo la 26a	18:30 - 20:00		-Kunveno

Vorto de la Prezidanto

Karaj amikoj kaj simpatiantoj,

Esperanto Aktuala revivas !

Ni unue danku la antaŭan teamon, Laŭrenzo kaj Sammy, ĉar ili tre bone vivtenis ĝin dum pluraj jaroj. Sed kiam la evoluo de iliaj vivoj ne plu ebligis ke ili daŭrigu, ni ne trovis anstataŭanton. Iuj proponis sin, sed ne sukcesis trovi la tempon kaj energion ĉion kunordigi. Ja estas tamen iom da laboro. Ni do des pli danku al Sammy kaj Laŭrenzo ! Pro manko de kuraĝa redaktoro, dum kelkaj jaroj Esperanto Aktuala ne plu aperis.

Sed nia deziro redoni vivon al nia kara revuo restis granda. Jam unue por informi ĉiujn niajn legantojn kiuj ne havas la okazon veni al niaj kunvenoj. Kaj por instigi ilin trovi ion interesan en nia larĝa oferto.

Kiel do ni fine solvis la problemon ? Simple : se la tasko tro grandas por unu persono, ni trovu teamon ! Tiel Fransuaz, Nikolao, Ivo, Klara kaj Bernard-Régis estas nun la kerno de la teamo, kaj ĉiuj aliaj partoprenas kaj/aŭ partoprenos.

Kaj jen, la numero kiun vi nun tenas en la manoj, la frazoj kiujn viaj okuloj trakuras, formas la evidentan pruvon ke ni sukcesis.

Mi do jam silentu kaj lasu vin legi en la aliaj kontribuoj kiel nia klubo plu vivas, eĉ kun malpli da membroj, eĉ en tempoj kiam ne ĉiam eblas sekure kunveni fizike. Vi legos ke nia oferto de aktivecoj daŭre buntas, kun granda diverseco tiel ke certe devus esti minimume unu aktiveco tute taŭga kaj interesa kaj agrabla por vi. – **Ĝis baldaŭ kun ni !**

Via prezidanto, Bernard-Régis LARUE, por servi vin

Enhavo

Paĝo 2a : Kartografio (bildoj)	Paĝo 13a : Origino de la vorto VAKCINO
Paĝo 3a : Kolofono /Agendo	Paĝo 14a : Nova serio de prelegoj de Bernard-Régis : Kartografio
Paĝo 4a : La vorto de la Prezidanto Enhavo	Paĝo 15a : Muzeo pri popolaj muzikinstrumentoj
Paĝo 6a : Du studentoj vizitis nin	Bonvolu rekotizi por 2022!
Paĝo 7a : Vojaĝo per biciklo de Cirilo kaj Roz' en Tajlando	Paĝo 18a : Aŭtomataj subtekstoj en Esperanto
Paĝo 9a : Katastrofo ĉe Vinikosmo	Paĝo 19a : 107a UK en Montrealo
Paĝo 10a : Ofertoj de nia klubo	Paĝo 20a : Peko revenas en 2022
Paĝo 11a : Karaj legantoj de Aktuala	
Paĝo 12a : Recepto : Stufita bovidaĵo	

Du studentoj vizitis nin en De Pianofabriek

Antaŭ nelonge du studentoj kiuj vizitadas la mezlernejon en ties lasta jaro, Yahli kaj Mathias, kontaktis min. Por la kurso pri la franca lingvo ili devis kvarope prepari prezenton kun filmo pri iu temo kiun ili povis libere elekti. Ili decidis trakti la lingvon Esperanto.

Mi proponis rendezuon al ili la 17an de Oktobro 2021 en De Pianofabriek (tiam ni ankoraŭ rajtis fizike kunveni) kaj Yahli kaj Mathias, faris filmitan intervjuon de mi, dum ĉeestis ankaŭ Francine kaj Ivo. Yahli sendis al mi la iom pli ol 6 minutan filmon muntaditan kiun ili prezentis antaŭ la klaso.



Ni multe babilis kun ili kaj klarigis iom pri la historio de Esperanto ekde la komenco en Bjalistoko. Ili metis multajn demandojn kaj ni plej eble klare respondis.

Poste ni montris la variajn diversfakajn librojn kiuj vicas en niaj ŝrankoj:



lernolibrojn, vortarojn, romanojn, legolibrojn, movadolibrojn, religiajn librojn, bildstriojn, ankaŭ revuojn, ktp. Ili miris pri la diverseco de libroj.

Ni donacis al ili ekzemplerojn de *Monato* kaj *Aktuala*, triptikajn faldfoliojn pri iniciado al Esperanto, kaj T-ĉemizojn. Ili foriris ege kontentaj kun multaj informoj pri nia kara lingvo. Mi ankoraŭ poste sendis variajn ligilojn kiuj povos utili al ili por plenumi ilian taskon.

Mi ne ricevis ĝis nun informojn pri kiel vere okazis la prezentado antaŭ la klaso, sed Yahli tamen skribis ke ĝi estis tre sukcesa kaj refoje dankegis nin pro nia bonvenemo kaj la abundaj informoj kiujn ni provizis al ili.

Ĉu la aŭdintaro metis demandojn? Kiajn? Ĉu estis interesuloj inter ili? Mi ne scias kaj daŭre esperas respondon pri tio.


Raportis Nikolao de Buyl (EBG)

Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'

TAJLANDO

30/10 -> 28/11/2009 - 1196 km (11683 km)


(Daŭrigo)



Pulan salton ni realigas per aviadilo, kaj samtempe plurjarcentan salton futuren. Ni nun estas en la jaro 2552, kaj kiam tagmezas en Parizo, jam estas la 18-a en Tajlando.

Ni surteriĝas en la ĉefurbo kun la plej longa nomo en la mondo. Jes, ja! Krung Thep Mahanakhon Amon Rattanakosin Mahinthara Ayutthaya Mahadilok Phop Noppharat Ratchathani Burirom Udomratchaniwet

Mahasathan Amon Piman Awatan Sathit Sakkathattiya Witsanukam Prasit, kaj ni sampreze indikas al vi la tradukon, kiu modeste signifas "Anĝelurbo, urbego, loĝloko de smeralda Budho, nekaptetbla urbo de Dio Indro, granda mondĉefurbo ĉizelita per naŭ gemoj, feliĉa urbo, donema en la grandega Reĝa Palaco simila al la ĉiela domo, regejo de la rekarniĝinta dio, urbo dediĉita al Indro kaj konstruita de Viŝnukarno". Mallonge, resumite en unu vorto: Bangkoko.



Nia tago ĉiumatene komenciĝas je transportado per rapidega busŝipo. La tri dek numerigitaj **pontonoj ebligas ne memori la komplikan nomon de la haltejoj, kvankam ĉio estas skribita taje kaj angle. La ŝipoj ankaŭ tre utilas por eviti trafikŝtopojn. La unu nuraj de ni viditaj estis tiuj de fiŝoj saltantaj al malfreŝa pano intence vendata por ili ĉe la alŝipaj pontetoj. Ni tuj ŝategas tiun urbegon, samtempe tradician kaj ege modernan.

Ĉiu templo surŝimita de oro pli belas ol la antaŭa. La kuŝanta budho en Wat Pho, je 45m longe kaj 15m alte, prezentas kaprompilon por foti. La sia kapo mezuras kvar metrojn! Ni ankaŭ iras al la reĝa palaco Wat Phra Kaeo por vidi la smeraldan budhon sur ĝia trono. Ĝi aspektas ja eta dum ĝi sidas je 11 m super la planko sur soklo fajne skulptita kaj kovrita de maldika ora t a v o l o . Belas kaj kolorplenas ne nur temploj, la tajlandanoj havas naturan emon por dekoracii. La tombejoj estas



artaĵoj, la unuan rubujon de ni viditan ni kredis dekoracian eksan kuirpoton antaŭ ĝardendomo. La turismaj busoj kaj la telefonbudoj estas dekoraciitaj per bildstriaĵdesegnoj!

Sed ili ankaŭ ege aĉetemas kaj ĉie videblas reklamoj. Grandegaj televidekranoj surstrate anstataŭas niajn reklamŝildojn. Reklamoj videblas ankaŭ je ekranoj en ĉiu metroa vagono, sed ankaŭ je tiuj sur butikaj kaso, kaj eĉ je tiuj de monaŭtomatoj, aŭdeblaj kiam oni pasas apude.

Ĉio modernegas: la vojoj, la trotuaroj kaj la metrolinioj kuŝas iu super la aliaj. Per ŝtuparoj eblas suprengrimpi por paŝi sur longaj trotuaroj konstruitaj super la ŝoseoj por eviti danĝerajn vojkruciĝojn. Kaj super tiuj trotuaroj pasas metrolinio aŭ alia vojo. Aliflanke, daŭre necesas ŝuojn demeti antaŭ ol eniri en iujn butikojn kaj foje necesas ekvilibre kaŭriĝi sur iuj necesoj iomete pli altaj ol la planko. Ne facile por maljunuloj aŭ iu kun tordiĝinta maleolo.

La tajlandanoj famas pro senĉesa manĝado taglonge. Ni tuj adoptas tiun kutimon, ĉar logas nin la odoro de la rostataj fiŝoj surstrate vendataj sur motorcikloj kun kromĉaro transformita en vendotablon kun kradrostilo. Surstrate vendiĝas ankaŭ supoj, viandoj kaj koko sur pikstangetoj kaj, precipe, porkaĵon, kiun ni ne plu frandis de Eŭropo, antaŭ kvin monatoj. Aliaj moveblaj vendotabloj proponas senŝeligitajn kaj tranĉitajn fruktojn, kiajn ananasojn, mangojn, akvomelonojn, melonojn kaj aliajn ekzotikajn fruktojn. Kiam la vendisto opinias ke neniu plu aĉetos, li movas sian motorciklon, triciklon aŭ ĉareton por instaliĝi aliloke.

En iuj budoj de stratbazaroj ni kontentiĝas per fotado, ĉar estas vendataj vivantaj bufoj aŭ ankaŭ frititaj akridoj, limakoj kaj dikaj blatoj.

Post vizitado kaj manĝado, post zorgo de niaj spirito kaj stomako, ni nun

zorgu pri nia korpo per testo de tradicia masaĝo. La bonefiko tujas.

Poste, Cirilon logas tajboksa maĉo,



sed nur kiel spektanton. Ĉiu maĉo el la entute dek kvin komenciĝas de neŝanĝebla rito, speco de lantmova danco realigata de ambaŭ batalantoj kaj kiu utilas samgale por varmiĝi, logi la diajn favorojn kaj montri sian lertecon al la kontraŭstaranto.

Poste, venas la grava momento, kvin raŭndoj tri-minutaj dum kiuj estas rajtigitaj ĉiuj frapoj per la manoj same kiel per la piedoj kaj genuoj. La unua raŭndo estas relative kvieta kaj utilas precipe por pritaksi la kontraŭstaranton.

La intenseco pligrandiĝas dum la sekvaj raŭndoj kaj atingas sian paroksismon dum la lastega.

Tiame, la spektaklo videblas tiom sur la podio kiom en la stadiono, kie la spektantoj varmiĝas sekve al vetoj surloke realigitaj sur la seĝaro. Ili eligas kriojn je ĉiu frapo, same kiel ili mem donintus ĝin. Post la maĉo, la venkinto, montrata de la surpodia arbitro post decido de la flankaj juĝistoj, rajtas je ĵurnalista foto je batalanta pozo.

Roz' preferas iri al la festo Loj Krathong. Okaze de la plena luno novembro, post la pluvsezono, por danki la dummusonon malavarecon de la akvodiino Mae Konkha, la tajlandanoj vespere deponas sur la riveroj "krathong-ojn", boatetojn similajn al grandaj nufaroj aŭ naskiĝtagaj kukoj.

Ili konsistas el bananfolioj kaj surhavas florojn, kandleton kaj tri incensajn bastonetojn. Oni deponas ilin surriveren, kie ili flosas cele al realigo de deziroj. Ĉi saman tagon, al la ĉielo estas allasataj grandaj prilumigitaj vezikoj por ke ili fariĝu novaj steloj...

Ni piediras al malfama flosbazaro de Bangkoko. Post unu-hora marŝado tra la urbo ni fine trovas ĝin. Nia peno estas rekompensata, ĉar ni estas la solaj turistoj. Tie haveblas rostitaj astakoj, fiŝoj aŭ viandoj. La kuirado okazas per kradrostilo sur la vendista

barko, aŭ sur dua kontraŭa barko por eviti brulojn kiam motorŝipo apude pasas kaj movigas ĉion ĉirkaŭe.

Malaltaj tabloj kaj malgrandaj taburetoj staras sur centra pontono por la klientoj.

Kellkajn tagojn poste ni vizitos alian flosbazaron 80 km-ojn for. Bedaŭrinde, troveblas nur varoj kaj ĉirkaŭaj vendejoj porturistaj je nekredeble altaj prezoj, kaj ĉie svarmas nur turistoj ĵus elirintaj de sia buso, kompreneble!

Male, ili malmultas en la Pasteur-instituto de Bangkoko, kiu gastigas serpentan farmon kun ekspozicio kaj alpublika prezento kaj, en la fino, konkreta kontakto kun tiuj ĉarmaj bestoj tiaj glitecaj kiaj fiŝoj.

Ni resurvojiĝas kaj ni la unuan fojon malkovras kokosajn arbarojn kreskantajn kun la radikoj en akvo kaj, poste, ananas- kaj bananplantejojn,



ankaŭ kaŭĉukajn arbojn. Ekde kiam ili sentas nian proksimiĝon, simioj forfuĝas sur la arbojn.

Daŭrigota

Post la fajro, ĉijare ankaŭ akvo détruis ĉe Vinilkosmo

Terura kaj katastrofa nokto por Vinilkosmo, je la deka de januaro : grava inundo dronigis la oficejon, plurajn provludejojn kaj parton de la registrostudio. Ili devas ĉion purigi, forĵeti multon, reordigi,...

**Esperantistoj, subtenu ilin :
aĉetu KDojn , sendu mesaĝon por kuraĝigi ilin !**

La unua eldono de la jaro 2022 ĉe Vinilkosmo, la 7an de januaro : albumo « Veko » de BaRok-Projekto el Brazilo, malkovrinda ĉe Vinilkosmo. La fondinton de tiu bando, Rafael Milhomem, malkovru ĉe Varsovia Vento



<http://www.podkasto.net/2020/10/16/la-147a-elsendo/>

Ofertoj de nia klubo

Tutunue grava atentigo : dum kelkaj dekoj da jaroj, ni kutimis kunveni merkrede. Sed nun ni kunvenas **MARDE**. Kial ? Simple : ni uzas la lokojn de la kulturcentro « De Pianofabriek » en Sankta-Giliso, rue du Fort / Fortstraat, 35. Kaj ili decidis, ekde la nuna akademia jaro, rezervi la merkredon al porinfanaj aktivecoj. Do ni elektis kunveni marde. Kaj arde 12.

Kiel funkcias nia klubo en tempo de pandemio ? Kompreneble ni devis adapti nin.

Dum pluraj periodoj, tutsimple estis malpermesite kunveni fizike. Kaj danĝere cetere. Sed tio ne signifas ke ĉesis niaj regulaj kunvenoj. Ili simple iĝis retaj. Ni do kunvenas dum tiuj periodoj per Zoom.

Se vi ne jam ricevas niajn invitojn, petu tion de Nikolao <ĉe> esperantobruselo.org.

Ja kunveni tiel ne ebligas la samajn rektajn kontaktojn kaj konversaciojn kaj transdonojn de paperaj dokumentoj ktp.

Sed kompanse ni povas tiel bonvenigi partoprenantojn el tre multaj landoj ! Regule partoprenas Angelos el Ateno aŭ Paŭlo el Lisbono aŭ Bernard-Régis el Königswinter ekzemple. Sed ankaŭ homoj el pli ol 15 europaj landoj, kaj regule homoj el Usono, Kanado, Brazilo, Japanio, Ĉinio, ktp ktp.

Ili ja povas trovi niajn aktivecojn, same kiel vi, en la retejo Eventaservo.org. Se vi ne konas ĝin, iru rigardi, tiu retejo donas informojn pri esperanto eventoj tutmonde, tago post tago, kaj ĝi estas tre facile uzebla.

Ni anoncas kaj preparolas niajn aktivecojn en aliaj retejoj : ni ja havas Facebook-paĝon (Fejsbuk se vi preferas) : « [esperantobruselo](https://www.facebook.com/esperantobruselo/) » (<https://www.facebook.com/esperantobruselo/>), kaj diskutgrupo en <https://groups.io/g/Esperanto-en-Bruselo>.

Kaj kio pri la kursoj ? Same ! Kompreneble por kursoj des pli gravas fizike ĉeesti, tiel ke Fransuaz povu bone montri sian materialon, uzi gestojn, puŝi la homoj al interago. Sed ŝi tion tamen bone sukcesas ankaŭ rete. La kursoj tiam okazas en alia tago de la semajno, ĉar ni disponas pri 1 abono al Zoom. Notu ĉi-tie ke la



oferto ŝanĝiĝis : ni nun proponas kursojn per duonaj jaroj. Ili tiam komenciĝas en septembro kaj en februaro.

Ambaŭ la kunvenoj kaj kursoj ja okazas fizike kiam la pandemio malpeziĝas. Ni tiam pli uzas distanciĝon, dank'al niaj grandaj salonoj, bone aerumitaj. Kaj kompreneble kun indiko de vakcino aŭ testo aŭ resaniĝo.

Male nia tradicia oferto de "Babilemaj Spagetoj" ne plu funkcias dum la pandemio. Ja temas pri manĝi kune en restoracio, libere laŭplaĉaj pladoj (malofte spagetoj fakte), kaj same libere babili pri io ajn. Ni volonte rekomencos en pli favoraj tempoj, la duan lundon de la monato.

Same niaj fojfojaj promenoj kaj vizitoj provizore ne plu okazas. Nek ni organizis Zamenhof-feston.

Sed nia biblioteko daŭre estas je via dispono. Ni plu revas aktualigi ĝian katalogon. Sed memoru ke multaj verkoj en esperanto estas prunteblaj el ĝi, kiam la kulturcentro estas atingebla.

Bernard-Reĝis Larue

Karaj legantoj,

mi dankas vin pro ke vi portis atenton al tiu provo por denove eldoni nian Bruselan revuon, « Esperanto Aktuala ». Ni ŝatus kolekti viajn taksadojn pri tiu unua numero de espereble longa serio.



Bonvolu sciigi al ni kion vi ŝatas kaj ne ŝatas. Ne hezitu fari komentojn

Kio mankas?

Kiel vi trovas la aspekton? Ktp...

Aliflanke ni ŝatus ke Bruselanoj provizu al ni novaĵajn aŭ historiajn artikolojn pri Bruselo (kaj ties ĉirkaŭaĵo), recenzojn pri libroj, KDoj, spektakloj, ekspozicioj, desegnaĵojn, ludojn, receptojn, ktp... Antaŭdankon al vi.

Bonvolu sendi viajn mesaĝojn al aktuala@esperantobruselo.org

Notu ankaŭ ke Esperanto Aktuala estas ankaŭ legebla kaj elŝutebla tutkolora rete sur la dediĉita retejo de <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>

Stufita Bovidaĵo (Franca specialaĵo)

Ingrediencoj :

650 gr	da suĉbovida viando kun ostoj
700 gr	da hakita viando el porko kaj bovido
3	karotoj diskete eltranĉitaj
2	cepoj malfajne eltranĉitaj
1	plena cepo pikita per 2 kariofiloj
1	dika ajlero
	timiano, laŭro, salo, pipro kaj muskato
1 ½	supkulero da pulvero el ligita bovidaĵa suko
37 cl	da seka blanka vino
400 gr	da ĉampinjonoj
1	citrono
	iom da kremo
1	ovoflavo



Diskete eltranĉu la karotojn kaj haku malfajne ambaŭ cepojn. Distranĉu la viandon en dikaj pecoj kaj en rostpato ekrostu ilin kune kun la karotoj kaj cepoj, poste alŝutu iom da faruno.

Transŝutu la tuton en stufpoton kaj aldonu la cepon pikita per 2 kariofiloj, ajleron dispremita per tranĉilo, timianon, laŭron, salon, pipron, muskaton kaj 1 ½ supkuleron da ligita bovidaĵa suko diluita en iom da malvarma akvo.

Surverŝu 37 cl da blanka vino (aŭ parte per akvo) kaj lasu stufi dum tri horoj.

Purigu la ĉampinjonojn kaj eventuale distranĉu ilin (depende de ties grandecoj) kaj post la tri horoj, aldonu ilin kaj lasu kuiru plian horon.

Per la hakita viandomiksaĵo formu buletojn de $\varnothing \pm 3$ cm kaj kuiru ilin 10 minutojn en bolanta akvo kun iom da ligita bovidaĵa suko. Elgutigu la buletojn kaj enmetu ilin ankoraŭ varmajn en la stufpoton kvaronhoron antaŭ la fino de la kuirado

Tuj antaŭ la servado, ĝustigu la spicadon, aldonu eventuale iom da citronsuko kaj ekster varmegofonto, finu, dum vi miksas, per la aldono de ovojflavo antaŭe diluita en iom da kremo.

Servu kun bonaj sufiĉe firmaj terpomoj aŭ ankaŭ iuj ŝatas ĝin kun blanka rizo.

Tiu plado taŭge pariĝas kun bone ekvilibra blanka vino kiu devas samtempe alporti freŝecon per bela acideco sed ankoraŭ havi belan ĉeeston en la buŝo.

Bonan apetiton.

Nikolao de Buyl

Pri la origino de la vorto VAKCINO


La unua malsano, pri kiu estis trovita vakcino estis la variolo.

Variolo estas infekta, virusa, epidemia, tre danĝera malsano, ofte mortiga, kun febro kaj vezikoj sur la haŭto, kiuj fariĝas krustoj lasantaj cikatrojn por ĉiam.

Edward Jenner estis la unua, kiu malkovris efikan kaj sendanĝeran metodon por preventi variolon.

Li observis, ke laktistinoj, kiuj jam estis suferintaj pro bovovariolo, ne suferis poste variolon.

Tio indikis, ke inokuli bovovariolon protektas kontraŭ variolo. En 1796 li faris tiurilatan eksperimenton sur infano . Lia metodo pruvigis sukcesa, kvankam lia procedo restas kritikinda.



Edward JENNER (1749-1823), brita provinca kuracisto en Berkeley



La vorto vaccine (vakcino) derivas el Variolae Vaccinae (tio estas variolo de bov(in)o), termino uzita de Jenner por aludi al la bovovariolo (the Cow Pox).

En 1881, Louis Pasteur, 85 jarojn post la unua eksperimento de Jenner, proponis la nomon „vakcino" por ĉiuj similaj preparaĵoj kontraŭ aliaj infektaj malsanoj, honore al Jenner.

Françoise Pellegrin

Nova serio de prelegoj de Bernard-Régis : Kartografio

Pri kio temas ? Temas en tiu serio ĉefe pri la historio de la mapoj, tra la jarcentoj kaj la kulturoj.

De kiam mi interesiĝas pri mapoj ? De ĉiam mi emas diri. Jam knabo mi legis la mapojn kiel « piloto » de mia patrino sur la vojoj de niaj ferioj al Francio. Kaj ĉe la skoltaj mi aparte ŝatis kiam ni devis trovi nian lokon kaj nian vojon per mapoj.

kartografio de la geografia fako, kaj mi laboris dum unu jaro en la NGI, zorgante ke komputilo kapablu kalkuli kaj desegni la 'ombron' kiu indikas reliefon sur mapoj.

Jam kiel studento mi aĉetis reproduktajn de la mapoj de Ferraris. Kaj poste plurajn librojn pri kartografio kaj reproduktajn de malnovaj atlasoj. Sed mi revenis plene al tiu pasio en



Kiel studento, mi do jam aĉetis multajn mapojn, ĉefe tiam de Michelin, kaj de la NGI = Nacia Geografia Instituto de Belgio. Mi eĉ pinglis la mapojn de NGI je 1/50 000 sur du grandaj muroj de koridoro de la patrina domo, kunmetitaj por kovri la tutan Belgion !

Do mi ankaŭ elektis mapan temon por mia finstuda tezo por la informatika diploma: mi sekvis la kurson de

2021. Nun mi posedas ĉ 70 librojn pri kartografio, 53 reproduktajn de atlasoj (14a ĝis 19a jarcentoj), 2 de tergloboj el la 16a jc., 12 vere malnovajn mapojn, ktp.

Helpe de tiu materialo mi volonte dividas mian pasion per nova serio de prelegoj.



Jam okazis :

1. Kartografio en Antikveco (ĝis fino de la Romia tempo)
2. Kartografio en Mezepoko (ĝis komenco de la 15a jarcento)
3. La komenco de la grandaj esplorvojaĝoj kaj la kartografio en la 15a jarcento.

La venontaj estos :

4. La unuaj mapoj pri Ameriko, 1500-1520
5. La kartografoj de la 16a jarcento, en Mediteraneo kaj Germanio
6. La Skolo de Dieppe
7. La Skolo de Brabanto

Vi jam rimarkis ke mi sekvas kronologian sinsekvon. Sed poste venos ankaŭ temaj prelegoj, ekzemple pri la mapoj de la ĉielo (komprenu de la stelaroj, ankaŭ nomataj konstelacioj).

Do sufiĉe por kelkaj jaroj 😊

Tiuj mapoj estas ofte tre belaj. Ili atestas pri la historio, kaj pri la tiamaj kredoj de la homoj. Ili ofte plenas je fantaziaj detaloj. Tial ne mankas miro kaj intereso en tiaj prelegoj. Ili povas funkcii rete, sed eĉ pli bone fizike, kiam mi alportas mapon kun longeco de preskaŭ 7 metroj, aŭ terglobon aŭ malnovajn atlasojn.

Konklude : venu kaj miru !

Bernard-Reĝis Larue

Muzeo por popolaj muzikinstrumentoj

En Gooik, vilaĝo proksime de Bruselo, troviĝas vizitinda muzeo pri popolmuzikinstrumentoj kie jam kelkfoje mi organizis viziton (kaj pikniko aŭ manĝo en la restoracio), kombinante ĝin kun promeno en la bela kampara naturo. Ĝi estas buse atingebla ekde la suda stacidomo de Bruselo : 142 aŭ 141, poste 153; ekde la stacidomo de halle : rekta buso 153

Gooik

La komunuma administracio de Gooik decidis en 1995 transformi la malnovan bierfarejon de la bieno en Dorpsstraat en komunuman interkonatiĝan centron. Kune kun la impulso de Muzikmozaiko kreita far Herman Dewit (impulsocentro por popoluziko (Folk) kaj Ĵazo), la komunumo Gooik transprenis la instrumentkolekton kaj aranĝis la familiecan subtegmenton de tiu ĉi konstruaĵo kiel modernan muzeon.

Nuntempe Muzikmozaiko, asocio senprofitcela, okupiĝas pri la administrado de la kolekto, la instruo de la kunlaborantoj kaj la organizado de vizitoj.

La Muzeo pri popolaj muzikinstrumentoj estas malfermita ĉiutage (escepte de lunde kaj marde) inter la 10a kaj la 20a horo.

Komentata gvidado povas esti petata tra Muzikmozaiko, ankaŭ por aliaj tagoj kaj horoj.

Ĉion ĉi vi povas admiri ĉi tie.

En la organizado de la ekspozicio oni ne sekvis blinde ian sciencan linion. La instrumentoj estas arigitaj pli-malpli laŭ speco, kelkfoje kune kun bela malnova fotografiaĵo kaj eĉ en iuj lokoj kune kun plasta varianto el Tajvano. Bedaŭrinde la instrumentojn oni devas pendigi sekure malantaŭ vitraĵo ĉar la plej multaj estas tiom rompiĝemaj, ke ili ne povus postvivi oftan manipulado. Tiuj instrumentoj, kompreneble, dum organizita uzado retrovas sian antaŭan vivecon.



Kantistoj

Oni komencas la promenadon ĉe la « flugantaj folietoj ». Flaviĝintaj fotoj kaj fingrumitaj kantlibretoj memorigas pri la bazarkantisto, kiu post la dimanĉa meso proklamadis la novaĵojn pri la mondo pere de versaĉoj kantataj laŭ konataj melodioj. La tekstoj estis presitaj sur la tielnomitajn 'flugantajn folietojn' kaj disdonitaj au venditaj.

Dancpartituroj

Multaj dancmelodioj nun ludataj de popolmuzikgrupoj estis kolektitaj surbaze de partiturlibretoj de maljunaj fanfarmuzikantoj. Iuj el tiuj ĉi havis specialan libreton ĉemane por ludi en la trinkejoj post la rondirado de la procesio.

Instrumentoj

En alia ŝranko troviĝas klakiloj, knariloj, zumpoto (frottamburo), sonorilrimeno kaj diversaj aliaj perkutinstrumentoj kiuj memorigas nin pri la tempo, kiam oni iradis petkrii « Guŝdiel! » (t.e. la kvoto de Dio destinata al la malriĉuloj) ĉe la najbaroj dum la silvestra nokto. Triopo da bele ornamitaj tamburinoj kaj vjeloj ornamas la malantaŭan muron.



En honora loko sakŝalmoj, blokviolonoj kaj aliaj violonoj povas esti admirataj.

La dekstra muro, krom kelkaj, interese gaj publikaĵoj, estas dediĉita nur al flutoj. Tie oni trovas ĉiajn: bovkoronon, okarinojn, argilajn flutetojn, fifrojn kaj unumanajn flutojn. Prave tuta koridoro estas dediĉita al la burdocitro (hommel). Tiu instrumento tiom tipa por niaj regionoj meritas pli da atento. Ci tie ĝi estas trovebla en ĉiaj formatoj kaj formoj.



La centra vico montras muzikskatolojn, zimbalonon, vokokornojn kaj ksilofonojn.

Fine oni ankaŭ donis lokon al diversaj diatonaj akordionoj kaj maloftaj piedbasoj.

Sendis : Lydia Buyst

Tradukis : kennisbeurs Dilbeek

Adaptis : Nikolao de Buyl

Muziekmozaïek, Folk en Jazz

Wijngaardstraat 5,

1755 Gooik

02 532 28 38

info@muzmoz.be



www.muziekmozaiek.be



Bonvolu ne forgesi rekotizi por 2022

Nro	Kodo	Kategorio	Kotizo	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO 2022				
11	MEM	Membro de EBG	15 €	Partopreno en la vivon de la Grupo
12	MEM-J	Membro - Junulo (< 26-jara)	10 €	
13	MEM-P	Membro - Pensiulo, senlaborulo		
14	FAK	Familia kunloĝanto	4 €	Partopreno en la vivon de la Grupo
15	+KUR	!! Aldona kotizo por kursanoj	+10 €	Kurso + materialoj
18	DVM	Dumviva membro de EBG	375 €	Membreco dum la tuta vivo (25 x MEM kotizo)


NOTOJ : Pagu al la bankkonto IBAN : BE87 5230 8055 0794, BIC : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo. Por efike subteni nian agadon, estas konsilinde membriĝi ankaŭ siajn familianojn, se ili ne kontraŭas Esperanton ! Nepre indiku la celon de via pago per literaj [aŭ, se vi ĝiras elektronike, ciferaj] kodoj, ekz. « MEM+2x FAK »

Aŭtomataj subtekstoj ĉe Jutubo, Zoom

kaj prononcekzercoj ĉe Duolingo baldaŭ en Esperanto

Ekde kelkaj jaroj, la ĉefaj dialektoj de la grandaj lingvoj, kiel la angla kaj hispana, havas funkcieblajn voĉrekonilojn. Pere de maŝinlingva lernado, kun granda kolekto de kelksekundaj voĉregistraĵoj kaj ties tekstoj, eblas evoluigi softvaron kiu plenumos la taskojn en la titolo de tiu-ĉi artikolo.

Imagu voĉkomandi vian telefonon per Esperanto. Aŭ ĉeesti Zum-konferencon



kaj senpene kompreni ĉiujn. Imagu la eblecon ekzerci vian prononcadon ĉe Duolingo, same kiel jam eblas ĉe aliaj lingvoj.

Imagu alŝuti filmeton al Jutubo kaj ne devi mane tajpi kaj ĝustigi la tempon de la subtekstoj (ege temporabe). Tio baldaŭ estos realo ankaŭ pri

nia lingvo, dank' al la kuniĝo de du malfermitkodaj projektoj, Komuna Voĉo de Mozilla, kaj la ĉifromono Miriado.

↓ *Emblemo de Miriado.*



Volontulado ĉe Komuna Voĉo estas ege facila. Oni eĉ ne bezonas krei konton. Oni povas komenci en sekundoj [musklakante ĉi tie](#) (sur reta versio de [Aktuala](#)).

Kun kolekto de 90 horoj, la voĉrekonilo ĝuste subtekstigis ~50% de vortoj. Mozilla eldonas novan version de la rekonilo ĉiujn 6 monatojn.

Por havi vere utilan, funkcieblan voĉrekonilon, necesas atingi 10,000 horojn da voĉreĝistraĵoj. Dum la projekto Komuna Voĉo lanĉis antaŭ 2 jaroj, konstatablas ke la kreskado estis tro malrapida. Feliĉe, antaŭ tri monatoj, investantoj de la projekto Miriado decidis financi la evoluadon de Komuna Voĉo en Esperanto. Nun volontuloj povas esti pagataj, plenuminte [ĉi tiun formularon](#):

En la Telegram-grupo t.me/miriadejo, oni sinorganizas pri volontulado ĉe Komuna Voĉo. Jam estas 129 membroj. Aliĝu kaj partoprenu!

Ligiloj - Fonto : [Diversteme](#). Originala Fonto: telegra.ph

107-a Universala Kongreso de Esperanto Montrealo, 6 – 13 aŭgusto 2022

Kongresa Peranto

Belgio Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine aŭ Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstr. 169, 2060 Antwerpen

La kongreso okazos sub la temo de:
**Lingvo, vivo, tero:
Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj**



Aliĝu: <https://uea.org/kongresoj>.

Detalojn ĉe <https://uea.org/gk/966>.



PEKO revenas en 2022



De pluraj jaroj, **PEKO** estas **LA kongreso en Belgio**. NEPRE venu kaj invitu viajn amikojn, genevojn, genepojn, najbarojn, E-lernantojn...

Kiam? De la **3a de Marto** (je la 14a) ĝis la **6a de Marto** (je la 13a)

Kie? **En Centre d'Hébergement du Château de Tilff**

Esplanade de l'Abeille, 9 4130 Tilff

Tilff estas turisma urbeto sude de Lieĝo. Ĝi situas en la kruta valo de la rivero "Ourthe". Tilff estas ĉirkaŭita de verdaj montetoj kaj ŝajnas iom perdita en la naturo (krom nokte por la lumigita proksima aŭtovojo). La

loĝejo estas en la centro de Tilff, tre proksime de la stacidomo (300m) kaj ĉiuj facilajoj. La loĝejo estis renovigita kaj lastjare pligrandigita. Estas privata korto, eta ludilo por infanoj, unu granda salono por la manĝoj, du malgrandaj



kaj du novaj grandaj salonoj por la programeroj kaj trinkejo.

Estas 16 ĉambroj de 2 ĝis 5 litoj (entute 50 litoj). Ĉiuj ĉambroj havas lavujon kaj duŝon. Ili estas en la sama etaĝo kaj koridoro. Pro tio, ni provos plej bone disdoni la ĉambrojn laŭ la bezono de la partoprenantoj.

Informoj kaj aliĝoj : <http://verdajskoltoj.net/peko/peko-2022/>

Aŭ kontaktu Valère : +32 485 517 552 info@verdajskoltoj.net